Dimanĉmatene okazis dua laborkunsido sub prezido de ĉefestranano Job Kars. La kunveno decidis sendi telegramon al la belga ĉefministro, opinii ke la aĝolimo de T. J. O.-anoj devas esti maksimume 25 jaroj — aĝolimo kiu devas ankoraŭ esti grade malaltigata —, ke la «Tutmonda Junular-Organizo» devas esti trairejo al la plenkreskaj organizaĵoj kaj devas harmonie kunlabori kun la landaj kaj internacia organizaĵoj. La kunveno esprimis kompletan kaj unuaniman konfidon en la T. J. O.-prezidanto Sano Krijt. Posttagmeze okazis ekskurso al la historia flandra urbo Brugge. Vespere okazis oficiala festkunveno en kunlaboro kun «Paco kaj Justeco», sekcio de Flandra Ligo Esperantista. Tiuokaze paroladis ankaŭ Sano Veenendaal pri novfondota revuo «La Vivo» kiu propagandus la Zamenhofajn konceptojn inter esperantistoj, kaj, per apartaj eldonaĵoj, inter neesperantistoj (tiu intenco ŝajnas al ni tre proksima de la celo de «Universala Ligo»).

Tiuj belegaj kaj ĝuplenaj tagoj forpasis tro rapide kaj lasis profundan impreson pri freŝa entuziasmo kaj juneca ardo. Longtempe la partoprenintoj memoros la vesperajn kunvidojn ĉirkaŭ la kampofajro, kiam aŭdiĝis kantoj jen entuziasmaj, jen sentoplenaj kun akompananta mandolinmuziko, kiam ĉiuj okuloj fiksigardadis la flamojn, kaj kiam ĉiuj konferencanoj revis senbride pri pli bela estonto por la tutmonda junularo al kies efektivigo ili fervore laboros.

PARTOPRENINTO.

GRAVA AVIZO

Pro libertempo en la presejo tiu ĉi numero devige aperas kiel duobla. Ni intencas kompensi per duoblampleksa numero en decembro.

La redakcio kaj administracio de «Flandra Esperantisto».

ESPERANTO-DICHTERS in vertaling

De oude garde heeft de Esperantotaal gesmeed, de jongere heeft haar veredeld, haar duizend facetten geslepen en is opgegaan in haar schoonheid, zooals deze zich doorheen het zieleprisma in kleurschakeering openbaart.

Onderstaand vers van den Russischen dichter E. MICHALSKI komt voor in zijn bundel «Prologo» (1929) uitgave «Sat» en werd gedicht in het jaar 1922, dus in de periode tusschen twee oorlogen, waarin de Esperanto-poëzie zich schitterend ontplooidde.

Sterrestijl

Sterrestijl, gij schoonheids perelpaal —

't vloeiend Esperanto spuit en spat :

klare triller van den nachtegaal

in de koele rust van Lentebad.

Liefde, hart-omvangend het heelaal,

glansschakeering in boekettenkoor,

dringt met klankgedachten van kristal

wierookgeurend in sonnetten door,

trilt in der verrukking melodie,

zoo in bittren traan als vreugdeschrei,

— zielevezel van de poëzie —

teeder in 't vizioen van droomerij.

Passievlod-verlangens, nooit geleid,

over 't groene liefdeveld gestort,

droombezieling stralend wijd en zijd,

weifelwarse vlam die nimmer kort.


Vóór der Schoonheid schitterende laan,

duurzaam doel van groothedsgragen lust,

in een lichaamlouze zielsbestaan

blijft bewaard mijn farniente-rust.

Naar Michalski : H. VERMUYTEN.



En «Sudhungarlanda Stelo» skribas Sano L. Kókényi i. a. : «...Ni, esperantistoj, ofte pensas pri la homarismaj ideoj de nia Zamenhof, kaj ankaŭ pri la letero kiun li adresis al la diplomatoj dum la unua milito. Oni ne subpremu alian nacian, oni konsideru la rajtojn eĉ de la venkitaj popoloj. Mi estas internaciisto, tamen ankaŭ mia koro doloras, se oni forpelas aŭ persekutas hungarojn nur pro ilia nacieco. Kompreneble la objektiva patrioto devas kondamni ankaŭ tion, se oni suferigas ankaŭ aliaj naciojn, kaj mi pensas, ke ĉiu bona esperantisto postulas la homajn kaj naciajn rajtojn por ĉiu homo kaj por ĉiu nacio. Do, for la sovinismon, kiu kaŭzis jam tiel multe da malbono!»

S. A. T.-Amikaro, N° 18 de marto 1946 en artikolo «Ni estu Homoj»: «Centmiloj da germanaj-aŭstraj militkaptitoj troviĝas je en Francio, ĉu en koncentroj, ĉu en labor-entreprenoj, ĉu en farmoj. Inter ili certe estas esperantistoj; ni preterlasu nenian okazon serĉi kontakton kun ili; ni subtenu ilin morale kaj helpu laŭ nia tuta povo.
Ĉiufoje kiam vi renkontas germanan kaptiton, demandu lin ĉu en lia taĉmento aŭ depoto ne troviĝas esperantistoj; se jes, provu iel-aliel atingi ilin. Faru ĉion por mildigi ilian sorton.»

Flandra Katoliko, N° 2 de februaro 1946 en nederlandlingva artikolo «Nürnberg»: «Ni aŭdis en radio-raporto pri la Nürnberga proceso ke malgraŭ la perfektaj rimedoj tie aplikataj por ebligi tujan komprenon seriozaj plendoj aŭdiĝis pri malkorektaĵoj en la tradukado.

Eble estas preferinda, ke nia kara lingvo ne kompromitiĝu en tiaspecaj procesoj, pri kiuj nur la historio povos diri ĉu tie estas juĝistoj kaj kulpuloj aŭ nur bonŝancaj kaj malbonŝancaj «samspeculoj».

«Esperanto Internacia» en junio numero skribis i. a. jenon en ĉefartikolo «Unu grandan Rondon Familian»: «Iu nia korespondanto diris, ke pri la neforgesblaj krimoj faritaj, respondecas la tuta germana popolo. Teorie tio estas vera; kiel ankaŭ estas vere, ke pri maljustaĵoj faritaj kontraŭ Hindoj la tuta brita popolo estas respondeca; ke kulpas la tuta usona popolo pri ĉiu unuopa kruelaĵo farita aŭ farata kontraŭ negroj; ke la tuta belga popolo kulpas pri tio, ke en Kongo unu indiĝeno suferis pro rasa malamo; ke longe antaŭ la Hitlera reĝimo la tuta pola popolo respondecis pri la kruelaĵoj kaj pogromoj faritaj kontraŭ Judoj; ke... sed ĉu necesas daŭrigi?... Kulpigado estas luksaĵo, kiun oni preferu ne permesu al si, ĉar da ĝi ne estas fino.

En antaŭa numero ni donis fidindan raporton pri kunveno en Germanujo en kiu sin trovis kun Germanoj ankaŭ alinacianoj versajne el koncentroj. Se tio povas okazi, se viktimoj de la naciisocialisma teroro povas fratumi kun germanaj esperantistoj, kio restas direbla niaflanke? Kian rajton ni havas eldiri verdikton?»

En la aprila numero 1946 de «Kosmopolito» aperis artikolo pri la «Esperanto-Revuoj». El ĝi ni ĉerpas: «Kiam ni, esperantistoj, propagandas la lingvon, ni ne forgesas mencii, ke jam ekzistas abunda esperanto-gazetaro. Ĉu la kvalito de tiuj eldonaĵoj estas same ĝojiga kiel la kvanto? Bedaŭrinde mi devas nei tion. Ilia enhavo estas plej grandparte senvalora, kaj nur tre malmulte da revuoj enhavas de tempo al tempo artikolon, kiu rekompencas la penon de la legado.

Ekzistas esperantistoj, kiuj ne tro malleerte manipulas la lingvon kaj por montri tion, ili verkas ian artikolon por iu gazeto: ĉu la temo de la artikolo estas sufiĉe grava por vekti la interesiĝon de la legantoj, pri tio ili ne okupas sin: la celo estas montri sian kapablon kaj vidi sian nomon en la kolonoj de la gazeto. Kaj la kompartinda redaktoro devas enpresigi la artikolon, ĉar li timas la koleron de la verkinto: tiu ja povus eksciĝi. Pro tio la esperanto-gazetaro enhavas multajn artikolojn, kiuj neniam havas ŝancon aperi en naciaj gazetoj. Pro tio la esperanto-gazetaro — eĉ la plej bonaj — malsuperas la bonajn naciajn...»

En «Nederlanda Esperantisto» de junio skribis Sigislando Praganio: «La 25-an de julio 1943 S-ro Churchill estis proponinta la enkondukon de Basic English kiel internacia lingvo kaj nominta ministerian komisionon por la studo de la afero...

Kaj mi konsciis, ke la ideo povus allogi lin: lernigi la aliajn popolojn iun suragaton de la angla lingvo, por ke ili povu kompreni la voĉon de sia majstro. Kaj eĉ se li ne ambiciis fari el sia popolo iun «Herrenvolk», li certe povis antaŭvidi la ĉiuspecajn avantaĝojn kiujn la britoj povus havi, se la aliaj popoloj lernus tiun angletan lingvon kaj estus ĝojaj, povi iom kompreni kaj esti iom komprenataj de la afable ridetantaj anglaj moŝtoj...
Kiam mi estis, post la liberigo, en Anglujo, mi eksciis, ke S-ro Churchill disponigis la sumegon de 1.000.000 da anglaj funtoj por la intereso de tiu «lingvo», sed ke la propagando tute fiaskis, ĉar la brita popolo estis tro praktika por ne vidi, ke temas pri senespera afero.»

«Esperanto», la organo de Universala Esperanto-Asocio publikigas «pozitivan programon» el kiu ni ĉerpas: «Ĉefa kaj unua kondiĉo de rapida rekonstruo de nia movado estas la ordigo de la internacia organizo, tio signifas, ke estu nur unu organizaĵo internacia, anstataŭ du sin konkurencantaj. Alia kondiĉo estas, ke estu deklarata kvinjaro de stabileco, tempo dum kiu ne estu diskutata publike ia organizaĵprincipa problemo. Ĉi-tiuj du kondiĉoj realigitaĵ, estu starigata programo por kvinjara laborado, kun aŭ sen fikso de atingota celo.

Tiu-ĉi «kvinjarplano» devos enteni sekvantajn klopodojn: 1. Esplori la eblecon restarigi la movadon en la USSR, kie Esperanto komplete malaperis.

AL LA REUNUIĜO! U. E. A. - I. E. L.

La 21-an kaj 22-an de julio pasinta okazis en Bern kunveno de reprezentantoj de «Universala Esperanto-Asocio» kaj «Internacia Esperanto-Ligo» por interkonsenti pri kunfandiĝo de la du organizaĵoj, kaj por ĉesigi la duecon en la neŭtrala internacia Esperanto-movado.

Post du tagoj de tre amika diskutado, oni trovis favoran bazon nun submetotan al la estraroj de la du organizaĵoj. La interkonsento respondos al la celoj de la du partioj kaj certe ĝojigos la tutan esperantistaron.

La reprezentantoj estis: C. C. Goldsmith, Hans Jakob, Hans Kürsteiner.

La kunvenon prezidis Prof. Edmond Privat.

La estraro de Flandra Ligo Esperantista publike dankas ĉiujn redakciojn kiuj publikigis la deziresprimojn de la XI-a Kongreso de Flandra Ligo Esperantista favore al la unueco en la neŭtrala internacia Esperanto-movado.

La prezidanto,
D-ro T. van Gindertaelen.

2. Klopodi ke la Aŭtoritato Okupacia en Germanujo, permesu nian agadon.

3. Repreni la interrompitan laboron pri Interŝtata Akordo pri Esperanto.

4. Ekzameni funde la diversajn aspektojn de niaj kongresoj, celante seriozigon de tiu-ĉi manifestacio, fariĝinta pli malpli turisma okazaĵo. »

En «Franca Esperantisto» de marto-aprilo Sano Pierre Petit proponas plimodernan propagandan taktikon: «Ni devas unue konsideri Esperanton kiel varon, kiun ni devas vendi. Kaj ni devas demandi: «Kiamaniere ni povus plifacile vendi tiun varon?»

Por vendi varon, la aĉetonto devas unue sci, ke la varo ekzistas. Do, ni devas montri al la publiko, la ekziston de Esperanto.

Ĉiu esperantisto, kiam li parolas kun alia homo, ne devas lin tedi per argumentoj favoraj al Esperanto, sed tute simple li informos lin, ke li ĵus ricevis leteron el Norvegujo, kiu temas pri... kaj kiu estas redaktita en Esperanto... kaj... finite. Al aliu, li diros, ke en 1935, li faris belegan vojaĝon al Tripoli, sur la ŝipo «Sinnia», je tre favora prezo, ke tiujn bonegajn kondiĉojn li ricevis dan' al la uzo de la helplingvo Esperanto kaj... finite. Al postmarkkolektanto — kaj ĉiu scias, ke la nombro de tiuj individuoj dekobliĝis depost 1939 —, li diros, ke li ricevis postmarkojn el eksterlando, laŭ tre malmultekostaj kondiĉoj, pere de esperantistoj en diversaj landoj... kaj finite...

En tiuj diversaj manieroj informi pri Esperanto, ni ne serĉos fari propagandon, ni nur serĉos veki la atenton, kaj duone la interenson...

En «Svenska Esperanto-Tidningen» ni legis: «Testamenta donaco al Esperanto»: En la mezo de julio atingis nin la informo, ke mortis nia samideano Albin Soneson en Emmaboda. Lia testamento ordonas, ke post depreno de 3.500 kr. la tutan havaĵon heredos Sveda Esperanto-Federacio kaj Sveda Laborista Esperanto-Asocio». La havaĵo grandparte konsistas el domo, libroj ktp. Oni vere sentas koruŝon pro la flama amo al Esperanto, kiun montras la testamento. Tie oni legas ekz.: «Mi deziras je mia enterigo ne paroladojn kaj ne florojn. Sed se iu deziras honoru mian memoron, li tion faru per donaco al la Esperantomovado.»

EERLANG VERSCHIJNT

Leidraad bij den Esperanto - Radiocursus IN AFZONDERLIJKE LESSEN

De lessen worden aan de inschrijvers om de week gezonden en bevatten o.a. steeds de verbetering van de vorige oefening. Prijs: 35 fr. te storten op postrekening 32.68.51 van het Vlaamsch Esperanto-Instituut V. z. W., Brussel.

ONONTBEERLIJK
VOOR WIE DEN RADIO-CURSUS
MET VRUCHT WIL VOLGEN.

Plaatselijk Nieuws

ANTWERPEN. — Dhr. Fr. van Dooren sprak op 4 Sept. j. in het Esperanto-Huis der Lange Leemstraat 127, over « La Psikologio de la Egoismo ». Op Woensdag 2 Oct. te 20 u. handelt dhr. R. van Eynde over « Impresoj pri la Stokholma Kongreso ». Belangstellenden zijn steeds welkom! De tooneelafdeling is reeds bedrijvig met het oog op het aanstaande Zamenhof-feest van December.

BRÜGGE. — Op 29 Augustus vergastte de Nederlandsche zangleerares Annie Helink « Paco kaj Justeco », pl. afd. van den Vl. Esperantistenbond, op een Schubert-avond. Aan het klavier: Mej. M.-L. Roose. Een kunstgenoot voor de aanwezigen!

BRUSSEL. — Op Maandag 10 Aug. sprak voor een groote schaar belangstellenden dhr. Karl Erik Karlsson uit Stockholm over « Zweden, volk en land ».

Op Zondag 8 Sept. bezochten de Esperantisten uit de hoofdstad de jeugdvereniging « Juneco » te Braine-le-Château.

GENT. — In samenwerking met Flandra Esperanto-Instituut werd door de Gentsche Esperantisten op de internationale handelsfoor van Vlaanderen een merkwaardige Esperanto-stand ingericht.

CAPITRO 15-a.

Kant dume ne dormis.
Li intencis senprokraste aliri la flegejon por ekoni la rezultaton de la esploro, sed li ŝanĝis sian decidon kaj frapis sur la pordon de la geedzoj De Groot.
Li aŭdis, kio ege mirigis lin, la ĝentilan voĉon de la Profesoro mem krei: « Eniru! »
La spuristo nevole ridetis, rimarkante kiel zorge la maljunulo aranĝas la kusenonjn malantaŭ sian edzinon. Rekonante la vizitanton, la Profesoro konfuzite rigardis lin.
« Ne koleru, sinjoro Kant, sed mi... Vidu, mia edzino nun preferas resti sube. La ĉama klaĉado pri la krimoj supre... Vi komprenas, ĉu ne? Sed nun ŝi komforte sidas, ĉu ne, kara?... Mi tuj eklaboros, sinjoro Kant. »
« Ne gravas, sinjoro Profesoro. Ne neglektu vian edzinon pro mi. »
« Vi estas afabla, sinjoro Kant. Ĉu vi satas cigaron? Konjakon aŭ viskion? »
« Neniu el ambaŭ, sed vi preparu alian trinkaĵon por mi. »
« Nu, venenon? »
« Pardonu mian edzon », ridetis la maljuna sinjorino, « li suferas teruran profesian misformon. » Ŝi pentrinde, sidante meze de kusenoj en apogseĝo. Krono da arĝente blankaj haroj kadrís la palan vizagon, kiu same kiel la manoj, interplektitaj en ŝia sino, forte kontrastis kun la nigro de ŝia simpla, eksmoda jupo.
« Neniol grave, sinjorino », Kant respondis, kaj turnante sin al ŝia edzo: « Sinjoro Profesoro, ĉu vi ne povas havigi al mi iun kontraŭdorman drogon? Mi timas ke dua senripoza nokto atendas min kaj mi volas konservi la kapon klara. Hejme mi disponas ion kio maldormigus eĉ noktgardiston. Kion vi opinias, ĉu eble? »
« Neniu pli simpla, Inspektoro. Kiam vi volas havi ĝin? »
« Nu, prefere kiel eble plej rapide. »
« Eĉ antaŭ la analizo de la pulvoraĵoj? »
« Jes, certe... »
« Ĉu vi kuniras, sinjoro Kant? Tiu drogo tuj pretas. »
« Tiukaze mi atendos momenton tie ĉi. En la flegejo ne tiel agrablas. »
« Ĉu vi trovas, Inspektoro? » Rideto ludis ĉirkaŭ lia buŝo. Nu, ĝis post paro da minutoj. Tagon, edzino, ne turnu la kapon al sinjoro Kant, ĉu ne... « Okulumante li fermis la pordon malantaŭ si. »
Kant komfortigis sin en fotelo.
« Vi nepre ekskuzu min, Sinjorino, ĉar mi tiom disponas vian edzon. Mi timas ke mi tre ĝenas vin ambaŭ. »
« Ne grave, sinjoro Kant », ŝi indigis.
« Tio eble ŝajnos iom freneza, sed mia edzo ŝatas ion tian. » Kun tremetanta voĉo, ŝi aldonis: « Mi ne kapablas forgesi unu sekundan la tutan historion. Mi antaŭsentis ĝin. La homoj ne estas bonaj, ne... »
Sed Kant jam unufoje eksciis tion ĉi.
« Vi kompreneble terurigis tiun ĉi nokton? »
« Tute ne, mi eksciis ĉion nur ĉi-matene. Mia edzo ĝentile ne tuj rakontis tion. Alie mi kompreneble ne estus ferminta okulon. Li estas tiel bona por mi! » La lasta frazo estis sentoplene eldirata.
« Ha! Vi jam ripozis kiam oni venis voki lin? » La demando sonis tute senmalice.
« Ne, ne, ni ne jam enlitiĝis. »
« Ĉu vi ĉiam tiel malfrue maldormas? »
« Ofte. Mi ĝenerale ne tro bone dormas kaj kiam ni tro frue enlitiĝas, la noktoj foje tiom senlime longas. Sed ĉi-nokte mi tamen estis laca. »
« Vi legis? »
« Ne, tion miaj okuloj ne plu ebligas. Mia edzo voĉlegis. »
« Kaj vi ne ekimis, kiam Higgs tiel abrupte venis voki vian edzon? »
« Tute ne! Kuracistedzino kutimas tion, sinjoro Kant, ŝi mallaŭte sopiris, mi pensis ke ŝipano vundis sin. Rapide poste mi endormiĝis. Mi cetere estis tiel laca. »
Kant etendis manon al libro, kiu kuŝis sur tableto kaj legis la titolon.

Aan duizenden belangstellenden werd mondeling inlichtingen verstrekt, honderden propagandabrochures aan den man gebracht, tal van handteekeningen ingezameld voor het wereldpetitionnement voor Esperanto en tienduizend vlugschriften verspreid.

Bij gelegenheid van de wijkfeesten voerden de leden van « Amika Rondo » een intensieve propaganda. Dhr. Lampo die voor het raam van zijn woning een suggestieve tentoonstelling had ingericht, boekte een bijzonder mooi resultaat. Ook de opgestelde luidsprekers werden voor de propaganda gebruikt. Een mooi aantal brochures en leerboeken werden geplaatst. De groene-maand-actie werd flink gevoerd!

SOLVO DE LA 14-a ENIGMO

Kapelo. Batalo. Sitalo. Branko. Epoko. Monato. Kateno. Limako. Anaso. Lanugo. Nimfo. Bruto. Noktuo. Karesi. Koturno. Kitelo. Planto. Idealo. Bronko. Akonito. Araneo. Frambo.

Pli bone malfrue ol neniam.
SOLVO DE LA 15-a ENIGMO
HORIZONTALE. — 1. laŭtparoliĵo. — 2. baptopatrin. — 5. ovaci; motiv. — 7. ermit; estas. — 9. interpelaci. — 11. telefonisto.

VERTIKALE. — 1. librotentist. — 3. plasm; tol. — 5. peoni; tarif. — 7. rearm; etern. — 9. lir; tetra. — 11. lingvistiko.

NIAJ ESPERANTO-ENIGMOJ kun premioj

ATENTU: La regularon bonvolu legi en la januara numero! La solvoj de la du antaŭaj enigmoj troviĝas fine de la antaŭa kolono!

PREMIO: Sano P. H. Mooij el Bruselo gajnis la premion: « **Vortoj de Lanti** ». Ni gratulas la gajnton!

16-a ENIGMO : KRUCVORTO

HORIZONTALE. — 1. Terstrio inter du maroj, kuniganta du terpartojn (R); Mara gelateneca besto, kies ektuŝo sentigas brulumon, kiam tiu de urtiko. — 3. Desegni sur metalo per ŝtala pinto (R); Korboforma fiŝkaptilo. — 4. Sufikso (R); Komercujo (R). — 5. Ĝi protektas la strandon kontraŭ la movoj de la maro. — 6. Persona pronomo; Pers. pron. — 7. Rapide kaj neatendite okazanta; Numeralo. — 8. Konjunkcio; Sufikso (R). — 9. Tempo pasinta de post la naskiĝo (R); Aserti, ke io ne estas vera (R); La infanoj serĉas ilin sur la strando, por lude uzi ilin kiel pagilon. — 10. Sufikso (R). — 11. Strando (R); Stelforma besto (R).

VERTIKALE. — 1. Riverfiŝo (R). — 2. En ĝi la libertempanto satas ripozi surstrande (R). — 3. Varmega (R). — 4. Mara birdo (R); Moviĝi en akvo (R). — 5. Prepozicio. — 6. Promenejo super la maro; Prepozicio. — 7. Poseda pronomo. — 8. Sabla monteto ĉe maro (R); Ĝi veturas sur akvo (R). — 9. Rapida militŝipo por transporti telegramojn, ks. — 10. Tiujn marajn bestetojn la infanoj kaptas per retoj (R). — 11. Kio impresas flarsenton; Estrado (R).
Havigu la solvon al la redakcio antaŭ la 15-a de oktobro!

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11
1	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
2	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
3	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
4	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
5	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
6	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
7	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
8	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
9	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
10	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
11	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□

JAĤTO VETURAS EL...

Tradukis : Dro T. Ken.
Verkis : Deck Dorval.

« KRIMINALA ROMANO »

« Onidire, bela libro. Mi bedaŭrinde ne havas sufiĉan tempon por literaturo... Ĉu el tiu ĉi via edzo voĉlegis? »
« Jes, sed ni apenaŭ komencis. »
Kant senatente iom trafoliis la libron kaj remetis ĝin sur ĝian lokon.
« Via edzo vere amegas vin, mi kredas, sinjorino. Ĉu ne? »
Estis mallonga brilo en la lacaj okuloj.
« Ni tre amas unu la alian. Kiam jaron post jaro oni dividis ĝojon kaj ĉagrenon, nu jes... tre bedaŭrinde tiom da malbonaj homoj estas surŝipe, sinjoro Kant. »
Ŝi parolis tute simple, sen ia transiro, kvazaŭ ekzistus eĉ ne la plej eta distingo inter forflugintaj geedziĝaj jaroj kaj la senvirtaj pasaĝeroj.
« Kial vi opinias tion? »
« Mi sentas tion. Mi jam sciis tion antaŭ la foriro. Bono kaj malbono ege impresas min. Kiam oni malsanas kaj ne povas moviĝi kiel la aliaj homoj, oni evidente ekmeditas pli longe kaj funde pri ĉio, sinjoro Kant. »
La Profesoro revenis. Li triumfe enmanigis skatoleton al Kant.
« Jen ĝi jam estas. Sed ne trouzu, ĉu ne! Maksimume kvar ĉiutage kaj ne alkiutigu, ĉar alie vi ne plu fermos okulon vian tutan vivon! Ĉu vi ankoraŭ komforte sidas, edzino? »
Kant dankis, sed antaŭ ol foriri li ŝajne memoris ion.
« Ĉu antaŭ proksimume duonhoro mi ne vidis vin en la koridoro, sinjoro Profesoro: mi kredis... »
La Profesoro surprizite levis la okulojn. Ankaŭ lia edzino nee kapskuis.
« Min? Ne, neeble! Mi jam longe estas tie ĉi. » Kaj serĉe alparolante sian edzinon: « Mi kredas, edzino, ke la inspektoro urĝe bezonas la kontraŭdorman drogon. »
« Jes, kredeble », Kant ridante koncedis.
« Nu, mi volas tuj provi ĝin. Li apertis la skatoleton. « Ŝajnas pizoj... Ne, ne nun mi konsumos ĝin. Mi tro grimacas kiam mi devas glutu ion tian. Nu, tagon, sinjorino, tagon, sinjoro Profesoro. Ne forgesu mian analizon. »
Li rekte supreniris al la markonisto.
« Novajo por mi, sinjoro? » tiu ĉi demandis.
« Ne, ne jam. Mi nur volis saluti vian papagon. »
« Ĝi neniel miksiĝis en la tutan aferon », ridegis la radiisto.
« Mi ja scias. Mi nur volas vidi iun pri kies senkulpo mi tute certas », Kant respitis. « Mi havas fraŭndaĵon por ĝi. Jen, birdeto, jen io por vi. » Li jetis pilolon en la kaĝon.
Li birdo malfide rigardis la rondan buleton kaj eligis mallongajn fajfojn, kiajn oni aŭdas en la senfadena. Tiam ĝi saltis suben kaj enigis la pilketon.
« Vi ja ne venenas ĝin, sinjoro? »
La papago regrimpis sur sian bastoneton kaj sovis sian kapon tra la krado al Kant.
« Ne angoru, Vidu, li volas kroman. Ne, amiketo, alie... Sed nun, mia vico, ĉu ne? »
Kaj antaŭ la gapokuloj de la Morseviro, kiu observis la scenon kun mirego, Kant skuis du pilolojn en manon kaj senmove glutis ilin. Momenton poste li jam estis for.
Sur la ferdeko li vidis Yvonne Durlat. Ŝi ŝajne tute profundigis en sia libro aŭ almenaŭ ŝajnis sin tia.
Sube li frapis sur la pordon, kiu frontis la kajuton de la geedzoj De Groot kaj iom rikanis al la glima tableto, malantaŭ kiu staris en elegantaj literoj sub kroneto: « Comte et Comtesse de la Fosse ».

La grafino jetis signifan rigardon en la direkto de sia edzo. Tiu ĉi iom hezitis.
« Sincere parolante, sinjoro Kant, mi kredis ke estis tiu Dubois. »
Kant notis « tiu Dubois ». « Kial vi pensas tion? »
« Mi ne scias. Pardonu ke mi tiel parolas pri mortinto, sed mi ne fidis tiun viron. »
Kant atakis alian temon.
« Mi ne vidas kial mi sekretos tion. Sinjoro Maxton heredigis la pli grandan parton de siaj havaĵoj al la grafino. Ĉu vi sciis tion? »
Restis mallonga silento. Tiam sekvis singulto. Larmo perlís sur la longaj okulharoj de la grafino.
« Ni sciis tute nenion pri tio », la grafino mallaŭte diris kaj ne eblis al Kant decidi ĉu li verdiris aŭ ne.
« Vi bone konis la mortinton? »
« Neniu bone konis lin. Mi malgraŭe diru ke ni apartenis al liaj plej bonaj amikoj. Ni frekventis lin jam dekkvin jarojn. »
« Ĉu vi konis ankaŭ lian mortintan edzinon? »
« Ne. »
« Tamen la filinon? »
La grafino mallevis la okulojn.
« Jes », li ilustris, tiel mallaŭte ke Kant apenaŭ aŭdis ĝin.
« Sinjoro Grafino, ĉu vi eble povas rakonti al mi ion pri la privata vivo de sinjoro Maxton? Detalo iam jetas akran lumon sur la malhelon en kiu ni troviĝas. Kiel vi ekkonis sinjoron Maxton? »
La grafino ŝajne decidigis. Per nura gesto ŝi repuŝis la grafon, kiu volis peti ke ŝi silentu.
« Estas pli bone ke sinjoro Kant sciĉion, Hector », ŝi dolĉe parolis. Kun ioma voĉlaŭtigo ŝi diris plu. « Nu, mi ekkonis Elly Maxton en la edukpensiono. Ŝi estis preskaŭ sama aĝa kiel mi. Mi povas diri, ke mi estis ŝia unika vera amikino. Ŝi estis tre ĉarma knabino, sed malforta. Poste la amikeco daŭris. Proksimume dudekunu-jara ŝi ekkonis Hector. »
La grafino kapklinis al sia edzo, kiu fiksigardis antaŭ sin. Ŝi pludiris: « La geedziĝo jam estis decidita, kiam Elly dangere malsaniĝis, tiel ke oni timis pri ŝia vivo. Edzino... ne plu eblis. Kvar jarojn poste Hector kaj mi geedziĝis. Elly tre kuraĝe kondukis. »
La grafino momenton haltis, dum siaj okuloj malseke brilís. Ŝia voĉo vibrís de retenita emocio kiam ŝi diris plu: « Post tio okazis miraklo. Elly pliboniĝis. Sekve ŝi ekkonis ĉe la Riviera Jean Dubois, kiu tiel turms sian kompatindan kapon, ke ŝi fuĝis kun li al Sud-Ameriko... por tie morti. Sinjoro Maxton dekomence kontraŭstaris la rilaton kun Dubois. Tamen la morto de Elly estis terura bato. Li repaciĝis kun Dubois. Post la morto de Elly, li ankaŭ nin pli tirís al si. Mi kredas ke li konsideris nin la nuraj homoj kiuj memorigas lian filinon al li. »
« Dubois estis fripono, kanajlo », diris la grafino inter la dentoj, kaj Kant notis la egan malamon en liaj vortoj.
« Kaj sinjorino Maxton? »
La grafino rigardis supren.
« Si jam mortis antaŭ kiam ŝia edzo revenis el Ameriko. Elly neniam konis sian patronon. Antaŭe sinjoro Maxton sendube senluziĝis ofte en sia vivo. Sian tutan riĉaĵon li akiris en Eŭropo. »
« Li ĉiukaze estis energia viro. » Kant rektigis. Li ŝajnis kontenta.
« Tre malfeliĉa viro li estis, sinjoro Kant. » La grafino sopiris kaj metis sian belforman manon en la egan vilan de Kant.
La inspektoro malrapide promenis ĝis la kajuto de Maxton kaj singarde enpaŝis. En la klubfotelo li rimarkis Doktoron Gulopez, ŝajne endormiĝintan.
(Daŭrigota.)

Verantw. uitgever F.E.I. — Bestuurder : E. Cortvriendt, P. van Humbeckstraat 3, Brussel. — Drukkerij A. Hessens, Komcediantenstraat 12, Brussel.